



Kajeroj el la Sudo


BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

<http://www.distrito.com/esperanto/k37.htm>

<http://www.dragonfire.net/~Esperanto/k37.htm>

Esperanto sukcesas!

Segovia, eksplodo da libereco!



Lea Ligilo

N° 37

Januaro/marto 1998

Kajeroj



el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

Prezidanto: Martín Bustín Benito.
Apartado de Correos 4143
ES03080 ALICANTE

Vicprezidanto: María del Mar Guirao Gallego
Avdª Juan Carlos I, 22-8ª-H,
30800 LORCA (Murcia)
Hispanio.

Sekretario: José Pina Tuells,
c/ Stª Teresa, 22-2º CD,
ES30005 MURCIA

Kasisto: José María Bernabéu Franco
Gral. Primo de Rivera, 8
E-03360 Callosa de Segura,
ALICANTE (Hispanio).

Libroservo: Nicolás Gil Carballo,
Apartado 305
ES24080 LEÓN

Redaktoro: Jesuo de las Heras,
Apartado 4461
ES30080 MURCIA

Monsendo de kotizoj kaj abonoj al la
**nova konto n° 1302 0412 86
0022655110** en libreta de Caja Postal.
Sen aldona kosto. La abono kostas 1000
pesetojn. Kvintancon oni ricevos.

Pretigas la Kajeron:
Provkorekto: **José Pina Tuells,**
Administro: **Juan Antonio Cabezos**
Martínez,

Redakto: Jesús de las Heras Jiménez.

Kovrilo: La libra monro de 1997 de Mursjo sukcesigis Esperanton.

Enhavo

Informoj de la prezidanto	4
LEA-Ligilo 3 julio 1997.	5
Stato kaj estonto de SAT, Tagordo, Bonnovaĵoj el Hungario 5, Hungarlanda STA-informilo 5, SLEA, ILEA 6, S.A.T.E.B, PREM 7, Historio de LEA-Komitato de SAT 8, Bedaŭrinde 9	
LEA-Ligilo n-ro 4 novembro 1997:	
(Raporto de laborkunsidoj)	9
Instruado de Segovia:	12
Poeta angulo	16
Literatura Premio Francisco Máñez	16
Manuel de Seabra	16
Kutime Faritaj Demandoj: 20 al 23	17
Kialoj de mia agnosko de malsubmetiĝo	20
Esperanto viglas: Foirejo da libroj.	22
Centjariĝo de Guillermo Rovirosa.	24
Vi ekkonos Al-Andalus	26
La tajforegno de Murcia (fino)	27

Oni povas
reprodukti
artikolojn,
kondiĉe ke
oni citu la
originon.

*Ni ne korespondas
pri nepetitaj artikoloj.
Tamen, ni klopodos
publikigi ĉiun artikolo-
n kies enhavo estas
interesa kaj ne mis-
traktas iun ajn per-
sonon.*

*Pri la enhavo de
la artikoloj
respondecas la
aŭtoroj mem, ne la
redakcio.*

Redaktore

Finas nun la longa artikolo de Antonio Marco Botella pri la poemaj muslimoj de la Tajfo de Murcia. Pluaj artikoloj de tiu verkisto atendas nin ekde la venonta numero.

Grava novaĵo estas, ke de la 7-a ĝis la 14-a de novembro de 1997 nin ebligis memori Esperanton al la mursja civitanaro, kiel vi legos ĉe paĝo 22-a. Kadre de ĝi, oni invitis min prelegi pri nia lingvo, sed mi profitis la okazon por prelegi pri la manko, kiun Esperanto klopodas plenumi.

Nia prezidanto komentas la amikiĝon ekan de UEA kaj SAT, trovante interesajn deduktojn kaj sopiron al demokratieco ene de ambaŭ asocioj, dum Giordano Moya sindemandas pri progreso en paĝo 11-a.

La Liberecanajn Esperantajn Asociojn kunigis *LEA-ligilo*, verkita de Alan Gould. Ĉar ni kredas, ke ĉiu ano de regiona laborista esperanta asocio devus scii pri ĝi, ni decidis reprodukti ties enhavon en nia bulteno. Ekde la paĝo 5-a ĝis la 10-a vi legos numerojn 3-an kaj 4-an.

Guillermo Roviro estis hispana laboristo kiu luktis por pli justeco en sia tempo. Ni legos pri li je la paĝo 11.


Piero Bonaguri, itala gitaristo, sciigas nin pri sia majstro Andrés Segovia, kiu kreis internacian skolon gitaran, kaj fakte tre malmulte da gitaristoj hodiaŭ ne ŝuldas ion al li. Kontraŭe al nia politiko eldona, tiun artikolon oni ne rajtas reprodukti sen permeso de la aŭtoro.

Poetan angulon ni trovas en paĝo 16-a, rajde de vortoj de Georgo Preterido Peneter. Tiu poemo pruvigas, ke poemo diras multe pli ol aliaspeca tekstajo!

Kiom da personoj parolas Esperanton en la mondo? Tiu kaj aliaj demandoj ni klopodas respondi en paĝo 17. Atentu, se al ni mankas vian demandon -via aŭ farita iam al vi- sendu ĝin al ni, por ke ni inkludu ĝin en nia *Kutime Faritaj Demandoj*, atingebla el la tuta mondo pere de Internet. Notu ankaŭ, ke estas nova retadreso por HALE, **hale@distrito.com**.

Malsubmetiĝon armean klarigas al ni malsubmetiĝulo Plácido ĉe paĝo 20, kaj nia artikolo pri la foiro libra estas je paĝo 22. Mi esperas, ke vi ĝuos nian numeron de *Kajeroj el la Sudo*, kiun ni dediĉas memore al nia samideano kaj samurbano *José María Linares Ortuño*, kiu preteriris novembron, dum la libra foiro.

Ĝis!



Informoj de la prezidanto



Dum la 82-a UEA Kongreso en Adelajdo, la jaŭdon 24-an de julio, inter la 9-a kaj la 9'45-a horoj, en la Salono *Li Hajpin* okazis fakkunsido de SAT-membroj. Tiu-ĉi evento, kiun kelkaj komentas en diversaj artikoloj de niaj presajoj kiel historia, povas esti grava por la ĝenerala Esperanto movado. Unuiĝo en la agado de UEA kaj SAT devos ĉiam respekti la specifajn celojn de ambaŭ Asocioj. SAT membroj devos esti singardaj por ke la poresperanta laboro de UEA ne intermisiĝu en tiun peresperantan de SAT, eĉ se la du Asocioj laboros kune okaze de ĝeneralaj interesoj de la Esperanto movado. Laŭ mi, pri la kunlaboro de SAT kaj UEA, estas necese malfermi la debaton inter la membroj de SAT kaj ke ne nur la P. K. de SAT decidu.

Maltrankviligaj estas la diroj de la prezidanto de la OKK en Adelajdo, kaj samtempe membro de SAT, kd-o Kep Enderbi, kiu en la citita fakkunsido de SAT-membroj diris: *Mi pensas, eble herezie, ke la statuto (de SAT) estas eksmoda, reflektante la pensmanieron de la 20aj, 30aj ĝis 50aj jaroj. Dume SAT ŝrumpis. Ekspulato ne estas nun evidenta. Multaj ne pensas sin laboristoj. Por progresigi la aferon oni devas krei al si pli modernan bildon...* Laŭ mi nia kamarado pensis herezie, ĉar pri ekspulato de laboristoj ni ĉiuj scias ke la mastroj, la kapitalistoj, pagas kiel eble plej mizerajn salajrojn, kaj ili prenas la plej grandan parton de la riĉaĵoj kreitaj

de la laboristoj. Ĉu tio ne estas ekspulato? Kion diri pri la krima ekspulato de infanoj en Sudameriko, Hindio, Brazilo, ktp? La statuto de SAT, ne estas eksmoda, sed ili tiuj, kiuj ne volas vidi la realon ja estas.

Multaj ne pensas esti laboristoj. Certe. ĝenerale estas homoj kiuj neniam manlaboris kaj pro sia intelekta instruo okupis altrangajn postenojn en entreprenoj. Multfoje tiuj homoj (malgraŭ ĉio salajruloj) estas pli proksimaj al la mastroj por kontroli kaj akceli la ekspuladon de la laboristoj ol por defendi kaj mildigi iliajn laborkondiĉojn. Pro tio ili pensas ke ili ne estas laboristoj, ĉar ili estas ekspulataj en pli alta nivelo de la kapitalista sistemo. Nur kiam ili estas maldungitaj, kiel la aliaj laboristoj, ili povas kompreni la realon.

Kamaradece al vi,

Marteno

LEA-Ligilo.


Prezidanto Bustín kaj la redaktoro de *Kajeroj el la Sudo* konsentas, ke ĉiu ano de HALE devas scii pri LEA-ligilo. Sekve, ni transkribas la du lastajn numerojn de ĉi periodaĵo je la ses sekvantaj paĝoj de nia bulteno.

Lea Ligilo

N-ro 3: Julio 1997

Statutaj, celaj, financaj kaj ceteraj komunikoj

Woodrising, Thom Lane
Goshill, North Lincs,
England DN19 7LU
Tel: +44 (0)1489 530356



Informilo inter L.E.A.-oj de S.A.T.
"La LEA-oj mem decidis pri la enhavo"

Ron Lynn
15 Canterbury House,
Royal St., LONDON
England SE1 7LN

Tel: +44 (0)171 620 2950

E-Mail: alan@agolincs.damon.co.uk

E-Mail: rlynn@cix.computlink.co.uk

La ĉefa kaj plej grava temo por ni estos la aktuala stato kaj estonto de SAT

Per tiuj defiaj vortoj en mesaĝo al ĉiuj LEA-oj (Laboristaj Esperanto-Asocioj) pere de ĉi tiu ligilo, kamarado Kreŝimir Barkoviĉ, Sekretario de SAT elmontras celojn de la 1997-a SAT-kongreso.

Volonte tion kiel klariona vekilo al ni, Kreŝimir eĥas la nuntempajn pensojn kaj esperojn de ĉiu LEA enkadre de la SAT-rondo.

Ron Lynn de SATEB diskutante tiujn inspirajn vortojn kun mi, diris *Nia ĉefa metodo helpi estas pli konstrui kaj pli fortigi la LEAojn. Tiumaniere SAT devus gajni pli da forteco.*

Do ĉe Aŭgsburgo SAT povas alfronti sian estonton jam plifortigite per la nova entuziasmo de la LEA-aro. Ni laŭte respondas *Ekantaŭen Esperanto* al tiu klariona voko!

AGo

Bonnovajoj el Hungario

Sincerajn dankojn al k-do Guy Cavalier, Sekretario de LEA-K pro sendo de la unua numero de nove starigita.

Hungarlanda STA-informilo

Nia celo estas eldoni kvaronjaran informilon pri la hungarlanda SAT-movado, skribas Apáti Kovács Béla, redaktoro de la informilo, kaj hungarlanda peranto de SAT.

Ja tiu ligilo brave faras tion.

Tre informa kaj interesa ĉefartikolo pri la hungara laborista movado priskribas diversajn baraktojn de hungara proletaro ĉi-centjare. Sekvas detaloj pri la 70-a kongreso de SAT ĉe Aŭgsburgo, kaj postulo aranĝi tiun kongreson en Hungario en la jaro 2001! Gratulon kaj bonsanĉon al ili. Senpagaj kopioj haveblaj de H-700 Kaposvar, Béla kiraly u.44, Hungario.

Tagordo

de la LEA-komitato kunveno okazonta la 4-an de aŭgusto je la 16-a horo en Aŭgsburgo

1 Rezumo de ĉefaj aktivajoj fare de la

ĉeestantaj LEA-oj.

2 Kreiĝoj de Itala LEA kaj de PREM (Popola Rusa Esperanto Movado).

3 Propono farita al la LEA-Komitato en ILEA INFORMILO n-ro 3 — *En kunlaboro kun Germain PIRLOT*

(Belgio) lanĉi komunan iniciaton al la eŭropaj parlamentanoj de PSE (Partio de la Socialistoj Eŭropaj) kaj de SUE (Eŭropa Unuiĝa Maldeskrularo).

4 LEA-ligilo.

5 Elekto de LEA-Komitato.

6 Diversaĵoj.

Guy Cavalier,
Sekretario de LEA-Komitato
3, Rue de Nancy
FR-93800 Epinay, Francio

NOTO DE LA REDAKTORO DE LEA-LIGILO:

Ne pre rememoru ke laŭ la Statuto de SAT, ĉiu LEA-o rajtas sendi po du reprezentantojn al al supra kunveno. Ankaŭ rajtas ĉeesti po unu reprezentanto el landoj en kiuj ne ekzistas LEA-o. Por Esperanto, peresperante.

NI FARAS



kunlaborado ĝis la fina venko

SLEA

JARKUNVENO EN STOKHOLMO. 26-an de Aprilo 1997.

Reportas Pelle Perrson. Sveda Laborista Esperanto Asocio (SLEA) disponis pri la kunveno en "Parmis" Parmmätargatan 9 A, ekde la 12-a h. ĝis la 22-a h. Esp-libroj el Esperanto-Skolan estis aĉeteblaj dum la tuta tiama tempo. Lokaj SLEA-Klubanoj bonvenis ĉeestantajn SLEA-anojn el Gotenburgo kaj Huskvarna per regalo de buterpanoj ktp.

La plej grava demando por la jarkunveno estis ĉu ĝi ree akceptos la proponitan statutŝanĝon de la SLEA regularo. Post iom da diskuto estis tamen ree la decido de la pasintjara SLEA-jarkunveno akceptata, t.e. *Se estus decido pri likvidiĝo, devus samtempe esti decido pri dispono de eventuala posedaĵo de la asocio.*

La proponita nova teksto estas nun definitive akceptita de du sinsekvaj jarkunvenoj de SLEA, kaj ĝi tekstas jene: *Se estus decido pri likvidiĝo de la asocio SLEA, ĝiaj posedaĵoj estu je dispono de SAT, Sennacieca Asocio Tutmonda.*

(Kamarado Pelle Perrson klarigas en letero al LL: *Ĝis nun tamen ne estis diskutita en iu jarkunveno de SLEA eventuala malfondiĝo de ĝi.*)

Post la jarkunveno, ĉeestintoj komune manĝis, aŭ manĝante tion, kion la stokholmanoj senkoste donis, aŭ uzante la servojn de najbara restoracio.

ILEA

Certe nia nove kreita Itala Laborista Esperanto Asocio malŝparas neniun tempon! Jam alvenas la tria eldono de

ties rapide pliboniĝanta iLEA informilo. Dulingvajn artikolojn diskutas *LEA je internacia nivelo, La specifecoj de iLEA*, kaj oficialaj rilatoj kun la partio PDS (ĉefa partio de la maldekstro en Italio). Ankaŭ dulingve skribita, estas iLEA propono al LEA-Komitato kiu aperas en la tagordo por la LEA-K kunveno ĉe Aŭgsburgo. Kaj rigardu! Jen utila ideo!

Loka inform-servo de ILEA:

La iLEA informilo enhavas liston de dek du lokaj perantoj, kun nomoj kaj telefonaj numeroj. Pro tio, de Ancona al Venezia, iLEA-anoj povas ligi sin kun sia asocio. Bonege!

S.A.T.E.B.

Post ĝia aprila jarkunveno (raportita en LL2) Sennacieca Asocio Tutmonda en Britio vigle agadas. Anne Johnson, la SATEB sekretario, tuj skribis al la franca ambasadoro en Britio protestante pri enmigra leĝo de J.L. Debré. SATEDB komitato komisiis koloran reklamilon en *MSF at work*, dom-revuo de MSF sindikato. Jam respondis ne malpli ol dek du sindikatistoj, petante lerni Esperanton, kaj jam iuj aliĝis al SATEB. Jen laborist-movada varbado. Pro la fakto ke tiom da vizitantoj ĉeestis la jarkunvenon, SATEB sendis al ĉiu ekzempleron de *La verda Proleto* enhavante raportojn pri tiu okazo, ankaŭ SATEB aliĝilon. Do, espero pri novanoj. Tiu komitato ankaŭ elektis Ron Lynn kiel sia SAT Ĝenerala Konsilanto. Gratulojn Ron, vi bone labori/a/os.

PREM

Pere de sia PREM-bulteno n-ro 2 (kiu uzas sole Esperanton), PREM, Popola

Rusa Esperantista Movado, alia nove kreita LEAo, elmontras siajn estontajn boncelojn kaj esperojn. Ĝi komencas per bonvenigaj mesaĝoj de la SATa plenumkomitato, HALE, kaj Liberecana Frakcio de SAT. Tuje sekvanta estas rakonto pri la iom tumultaj rilatoj inter PREM kaj ERA (Esperanto Radikala Asocio). (Nu, ni ĉiuj havas niajn etajn problemojn PREM!) En bone konstruitaj artikoloj, Firdaus Ŝukurov debatas lingvo-etnajn problemojn en la postsoveta tereno, precipe rilate al Taĝikio, kaj redaktoro Nikolao Gudsov demandas *Ĉu ni povas kunlabori kun dekstruloj?*

Klariĝas al ni la grandegeco de la rusa ter-amaso kiam Aleksandr Titajev, prezidanto de E-klubo PACIFIKO, informis nin pri sukcesoj de la Vladivostoka Esperanto-movado! Alia kontinento, alia tempo-zono, sama lingvo. PREM-bulteno ankaŭ enhavas diversajn utilajn informerojn, inklude novaĵojn pri libroj, fakoj kaj pri Amikeca Reto, turisma servo de SAT.

Ankaŭ ricevitaj kun dankoj, *Kajeroj el la Sudo, LEA/G Magazino, Laŭte!* kaj diversaj aliaj eldonoj, sed pro manko de spaco ktp. Malgaje ankoraŭ silentas ASLE, la aŭstria LEAo. Ĉu iu konas ASLE-peranton?

Raporto kaj konto pri ĝisnunaj LL eldonoj estos havebla ĉe LEA-komitato de SAT.

LEA-Ligilo n-ro 4 eldoniĝos **04.11.97**. Bv. sendi viajn novelojn ne poste ol **14.10.97**.

Ju pli kune, des pli efike.

Redaktoro; produktisto; distribulisto:		Statutej, celaj, financaj kaj ceteraj komunikoj
Alan Gould Woodrising, Thom Lane Goshill, North Lincs, England DN19 7LU Tel: +44 (0)1489 530356 E-Mail: alan@agolincs.damon.co.uk		Ron Lynn 15 Canterbury House, Royal St., LONDON England SE1 7LN Tel: +44 (0)171 620 2950 E-Mail: rlynn@cix.compulink.co.uk

Informilo inter L.E.A.-oj de S.A.T.
"La LEA-oj mem decidis pri la enhavo"

Numero Kvar

novembro 1997

Historio de LEA-Komitato de SAT

En la periodo de la skismoj fare de IPE kaj ISE la skismigantoj uzis unu argumenton, kiu posedis certan pravecon. Ili plendis, ke la organiza formo de SAT ne ebligas rektan kontakton por kunlaboro kaj interhelpo de la diversaj LEA-oj.

Por forigi tiun mankon, kamaradoj Fulhauber kaj A. Veen, tiamaj prezidanto kaj sekretario de la nederlanda LEA (FLE) prezentis al la SAT-kongreso en Bruselo (1938) la proponon fondi LEA-Komitaton, kiu neniel ŝanĝante la organiz-formon de SAT mem kaj neniel miksante sin en per-esperanta agado de SAT, formos oportunan bazon por la kunlaboro de la konvencie al SAT ligitaj LEA-oj kaj okupos sin pri la internacia por-(propaganda) laboro. Kvankam la propono estis farata kun la celo forigi por la estonteco favoran argumenton por eblaj novaj skismigantoj,

La ankoraŭ tro freŝaj rememoroj pri la skismoj kaŭzis malfidon al la propono, ĉar pluraj timis, ke malantaŭ tiu propono sin kaŝas nova formo de internacio. Precipe en rondo de franca kaj brita LEA-oj, kiuj forte suferis pro la skismoj,

estis tre malmulte da entuziasmo. La brusela Kongreso forŝovis la definitivan decidon ĝis la sekvonta kongreso en Kopenhago (1939). Tie ĝi trovis plimulton, sed la baldaŭe poste eksplodonta milito malhelpis la efektivan konkretan ellaboriĝon de la propono.

Post la mondmilito la ideo pri LEA-Komitato estis re-starigata, kaj en Arhuza (1947) ĝi fine ekvivis. Dana, sveda kaj nederlanda LEA-oj tuj plenkonsente partoprenis kaj ankaŭ la brita kaj franca LEA-oj forlasis sian malfidan vidpunkton, konvinkite per la praktika evoluo pri la sincereco de la iniciatintoj kaj siaj samopiniantoj. Sinsekve aliĝis ankaŭ finlanda, itala kaj la provizore en Francio starigita hispana LEA-o. Krom tio ankaŭ SAT mem partoprenas en la komitato por tiel garantii anticipe la neblon de konfliktoj kaj por plene inter-konsentigi kaj interharmonii la agadterenojn de la internacia per kaj por laboro.

El la landoj kie ne ekzistas LEA-oj, aliĝis reprezentantoj de la laboristaj esperantistoj el tiuj landoj. Tiel Aŭstrio, Norvegio, Argentino, Belgio, Germanio kaj kelkaj landoj kie pro iu ajn kaŭzo ne ekzistas aparta LEA-o, estas reprezentitaj

en la komitato kaj per tio pligrandigas kaj plivastigas ĝian internaciecon.

La ĉefaj rezultatoj de LEA-komitato de SAT estas la pli kaj pli fortiĝanta interligiteco de la LEA-oj, la klare fiksitaj linioj sur la tereno de eldonado kaj librovendado kaj la eldono de plurlingva flugfolio. Ankaŭ kun UEA kreiĝis elasta kaj nedeviga formo de kunlaboro, kiu en pli oportunaj momentoj povos pruvi sian utilecon kaj forigi ja certajn miskomprenojn kaj konfuziĝon, kiu nur ĝenis klaran principan startopunkton de la laborista esperanto-movado.

Kvankam ne tre brue. LEA-komitato tamen montris sian utilon kaj akiris sian modestan, sed firman lokon en la kadro de SAT kaj la gotenburga Konvencio. (El *Historio de SAT*).

Bedaŭrinde

Ĉi tiu eldono de nia ligilo devas esti la fina de la nuntempa serio. Mi prezentis jarraporton al al LEA-Komitato de 1997 kun peto por permeso daŭrigi ĝis la venonta LEA-K kunveno en 1998. Kun la raporto estis aparta konto montrante elspezojn rilate al la tri ĝis tiam eldonoj, kaj ĝisdata sendolisto. Mi petis permeson elspezi sumon da mono el la LEA-K konto sufiĉa ĝis la venonta kunveno. Mi petis konsilon de ili pri la ricevontaro kaj aliaj aferoj.

Laŭ la protokolo (vidu poste) la 1997a LEA-Komitato ne konsentis pri tiuj petoj krom ia sugesto pri sendado per K-do Ivo Peyraut. (K-do Ron Lynn kaj aliuloj

sendis diversajn kaj memkontraŭdirajn opiniojn al mi pri kio tie okazis). Iu kiu deziras inspekti la supre menciatajn paperojn povos ricevi ilin de mi. Por ĉiuj aliaj LEA-K aferoj, adresu al la sekretario. Mi sendos pluajn klarigantajn detalojn al *Sennaciulo*. Mi dankas al ĉiuj kiuj helpis kaj kuraĝigis ĉi tiun tro mallongan veturon.

Kamaradece,

Alan Gould.

*LEA-Ligilo n-ro 4
novembro 1997*

LEA Komitato:

Raporto de la laborkunsidoj kiuj okazis dum la SAT-kongreso de Aŭgsburgo

Pro ampleksa tagordo okazis 3 kunvenoj, la 4-an, 5-an kaj 7-an de aŭgusto.

Sin esprimis laŭvice la sekvantaj delegitoj:

K-oj Hans RODEWIG kaj Friedel BUES por LEA-Germana.

K-do BUSTÍN Martín por HALE.

K-do HARDY Marcel kaj LEGROS André por SAT-Amikaro.

K-do PERSSON Pelle por SLEA.

K-do Domenico CONTI por Itala LEA.

K-do Lero VULFOVIC por PREM.

Jen komunaj ĉefaj aktivajoj kiuj estas efektivigitaj:

1 Regula eldono de bulteno.

- 2 Organizado de kursoj aŭ surlokaj aŭ perkorespondaj.
- 3 Konstanta zorgado pri libroservo.
- 4 Reeldono de vortaroj.
- 5 Reklamo per informiloj okaze de diversaj oportunaj okazaĵoj: surstrataj manifestacioj.
- 6 Starigo de Esperanto budo kadre de asociaj festoj.
- 7 Rilatoj kun sindikatoj.

Ĉiuj konfirmis pli malbonan ekonomian situacion en sia propra lando. Poste ni diskutis pri la du novaj LEA-oj kiuj deziris eniri la LEA-komitaton: Itala LEA kaj PREM.

Ĉiuj LEA-oj ricevis la statuton de itala LEA en majo 96. Antaŭ la Sankta Peterburga kongreso tiu nova asocio jam planis diskuti por aldoni paragrafon en kiu la Gotenburga konvencio esos agnoskita. La laboro estis plenumita komence de la jaro sed estis poste enordigita iom tro malfrue por esti diskonigita kaj ĉefe debatata en la asocioj. Ĉar la ĉeestantaj delegitoj ne estis komisiitaj por tuja akcepto de la nova statuto estis decidate ke la itala LEA eniros la LEA-komitaton post tri monatoj (ĝis fino de novembro) krom se iu LEA malakceptos ĝin.

Koncerne PREM (Popola Rusia Esperanto Movado) kvankam la regularo estis sendita al ĉiuj rekte el Moksvo, ŝajnas ke ne ĉiuj LEA-oj ricevis ĝin. Ni mencias ke jam la statuto entenas la Goteburgan konvencion (unua paragrafo b). La fakto ke SAT-membro aŭtomate iĝas membro de PREM (dua paragrafo

a) estas denove diskutita. La kandidateco de PREM estos definitive akceptata dum la Odesa kongreso.

La respektiva statuto estas aldonita al tiu raporto.

Sekve la proponon de itala LEA, t.e., kunlaboro kun Germain PIRLOT (Belgio) lanĉi komunan iniciaton al eŭropaj parlamentanoj de PSE (Partio de la Socialistoj Eŭropaj) kaj de SUE (Eŭropa Unuiĝo de Maldestrularo) estas decidite fari komunan deklaron pri uzo de Esperanto, esplorante la agadmanieron por ne kolizii kun la aliaj iniciatoj. Kontaktoj kun Germain PIRLOT estas necesaj. Tiu decido ricevis la subtenon de la kongreso (vidu gvidrezolucion paragrafo C en la septembra n-ro de *Sennaciulo*).

LEA ligilo, kiu estas la informilo por ĉiuj LEA-oj, prizorgita de Alan GOULD kaj Ron LYNN, aperis tri-foje en la jaro. Estas decidite sendi ĝin al la SAT-perantoj kaj al la Ĝeneralaj Konsilantoj (kategorio A), K-do Ivo PEYRAUT sin proponis efektiviĝi tiun laboron.

ASLE, kiu estas nia LEA en Aŭstrio, ne plu respondas al nia literaro. Necesas rekontakti ĝin.

La LEA-oj petis, ke la mona kontado aperu venontjare antaŭ la kongreso.

Elekto de la LEA-komitatoj: K-do Martín BUSTÍN akceptis la postenon kiel vicprezidanto kaj mi daŭrigas mian laboron kiel prezidanton kaj sekretarion.

Guy CAVALIER, Sekretario de la LEA-Komitato.
Epinay, 14-an de oktobro 1997.

3 Rue de Nancy, FR-93800 Epinay-sur Seine.
Francio.

KIO ESTAS PROGRESO?



Plena Ilustrita Vortaro, PIV, tiel difinas la progreson: 1. Ĉiu el la gradoj, kiuj estas iom post iom akirataj sur vojo al disvolviĝado, perfektigiĝado. 2. Antaŭeniĝado de la civilizo al pli

perfekta stato.

Kvankam laŭ PIV la progreso estas gradigita, oni povas kompreni ĝin, laŭ direktoj de malpli al pli progreso, en grandaj linioj de evoluo eltiritaj el la realo tra la tempo en gradoj de evoluo.

Estas progreso la apero en la naturo de la inteligento, kies disvolviĝo estas la konsciiĝo; aŭ la inteligento, kiu kapablas kompreni la inteligenton.

La homa socia grupiĝo trairas tiun ĉi linion: klanon, tribon, nacion... La atingota progreso estas la tutmonda organizo.

Pri politiko, de la ĉefeco en tribo aŭ la aŭtokratio reganta la socion ĝis la elekto per voĉdono de la regantaro kaj ties transformiĝo en nuraj administrantoj de la kolektivaj interesoj.

Kaj laste pri la ampleksiĝo de la libereco. Stagna socio ne donas liberecon. La libereco precipe konsistas en la posedo de multaj eblecoj de vivado, de pensado kaj ties esprimo.

Pri la moralo estas rimarkeblaj aliaj linioj de progreso en la humanigo. PIV difinas humanan: *posedanta la plej noblajn ecojn de la homo, kompatemon, bonfaremon, helpemon.* El tiu difino estas dedukteblaj la linioj de la humanigoj: humanigo de la homo en tio difinita en PIV; humanigo de la socio, tio estas pli solidareca ol konkuranta; kaj fine humanigo de la historio, sen militoj nek perfortaj revolucioj.

La progreso ne estas io aŭtomata nek stabila, ĝi dependas de la homa penso ligita al la homa agado. Ofte la momentaj individuaj interesoj estas kontraŭaj al la kolektivaj kaj tiel same la baldaŭaj kolektivaj interesoj povas esti kontraŭaj al la estontaj.

Alia konstato pri la progreso estas, ke ĝi preskaŭ ĉiam antaŭeniras neakorde. Povas esti progreso en unu linio kaj malprogreso en alia. Kiel malprogreso ni povas mencii la gentajn aŭ etnajn naciismojn, tute kontraŭaj al la planeda organizo kaj ankaŭ tiujn ideologiojn, kiuj propagas diktaturojn, eĉ la diktaturo de la proletaro. Ankaŭ progresemaj ideologioj, kiel ekologismo, povas fali en primitivismoj. Oni devas zorgi la ekologian ekvilibron de la naturo, sed de delasi la naturon en ĝian primitivan aspekton, ĉu ĝangalo, ĉu dezerto, kvazaŭ la homo ne ekzistus. La naturo evoluas senkonscie, sed la homo povas atingi esti la inteligento de la naturo, ĉar la homo estas la unika estulo kapabla konsciiĝi kaj krome, ankaŭ li estas parto de la naturo. Do, la homo devas zorgi la naturon tiel same kiel oni kulturigas kampojn kaj ĝardenojn. Delasi la naturon kvazaŭ la homo ne ekzistus, estas primitivismo.

Unu el la plej gravaj faktoroj de progreso estas la kulturo. Ni denaske havas nian naturon, kiu estas ligita al la animaleco. Se hodiaŭ en la mondo ĉiuj homoj mortus kaj nur restus unu tuj naskita infana geparo en ĝangalo kaj ni imagu, ke ili povus plu vivi, ili sciuis nenion kulture. Ili devus komenci el nenio. Ili ne posedos lingvon, nek skribon, ili ne konus la fajron, kaj kiam ili multiĝos, ne posedos socian organizon.

Eble post multaj miloj da jaroj ili atingos denove popolumi nian planedon, eble trapasos similajn civilizaciajn gradojn por atingi similajn kondiĉojn kiel en nia nuna socio. Sed poste en tiu trajrado, de la nuna grado de civilizacio fariĝos necese al ili, kiel ankaŭ al ni, klare

Finas en paĝo 21-a

Muziko

Instruado de Segovia: eksplodo da libereco

de *Piero Bonaguri*.

Dum mia unua infaneco mi konis muzikon kiel ĉarma afero, kiel parton de belo de vivo. La familio posedis pozitivan kaj unuecan koncepton de vivo, kiun mi alproprigis je senkonscia sed firma maniero.

Male, mia pasio pri gitaro eksplodis ĉirkaŭe kiam mi dekjariĝis, kaj dum mi trapasis el infaneco al adolesko: mia unueca kaj pozitiva koncepto pri vivo komencis disrompi, kaj sekve miaj plejŝataj restis tiel, kiel insuloj aŭ protektiloj izolitaj el la cetero. Sekvis, ke ne sole nekomprene perdiĝis, sed ankaŭ ravo.

La kialojn kaj pozitivajn pri tiu revo infana, kiujn mi tiam asertis kaj vidis, mi retrovis per feliĉa renkonto. Tio ĉi malfermis denove la eblecon por konscia kaj progresiva rehavo de kialoj kaj celi dediĉi mi al muziko, kaj ankaŭ permesis min, tial, profitegi ĉiun helpantan kontribuon al mia muzika disvolvo (inter kiuj kontribuoj, mia ekkono de Segovia havis gravan rolon).

Sekve, mi redankendas al miaj instruistoj pri gitaro, komencante la unuajn: **Leone Cecchin** (pr. ĉekin), kiu regis muzikvendejon en Forli, **Alvaro**

Fiorentini, instruisto pri trombono kaj korno ĉe *Liceo Musicale Masini*, en Forli (li ankaŭ ludis la kontrabason kaj prizorgis entuziasme muzikajn aferojn en tiu urbo), kaj fine **Pietro Batelli**, kies kono estis decidiva faktoro por daŭrigi



miajn studojn. Batelli enkondukis min en la mondon de la klasika gitaro, ĝia repertuaro, ĝiaj artistoj. Li ankaŭ kontaktigis min kun **Enrico Tagliavini** (pr. enriko taĝavini). Li estis malnova lernanto de Segovia en Siena. Tagliavini lernigis al mi la gitaron ĉe Konservatorio *Boito* de Parma, kiam mi diplomiĝis.

Mi ŝuldas ankaŭ al Pietro Battelli mian renkonton kun **Alirio Díaz**, al kiu mi sekvis en tiom da gitaraj seminarioj. Poste mi studis kun **Oscar Ghiglia**, kiu -kiel Díaz- estis unue lernanto de Segovia kaj poste lia helpanto kaj anstataŭanto. Nun li havas katedro ĉe *Accademia Chigiana* en Siena, kie mi studis en 1981.

Ĉiu lerna eksperto estis tre malsama ol la aliaj, sed ili ne kontraŭagis: ĉiu iel kontaktigis min al komuna muzika tradicio el kiu mi sukcesis ekhavi apar-

tan senton, sed sento arte valora, bongusta, disciplina, esence akordaj ene. Eĉ plie, neniu tiuj majstroj elhavigis min pri mia fascino fari muzikon, aŭ provis limigi mian personecon: ili ĉiuj ametis kaj helpis min.

Kontraŭ ĉiu tio, kiam mi jariĝis proksimume 25-e kaj jam finis miajn studojn, koncertis kaj laboris kiel instruisto pri gitaro, mi konfuziĝis rilate al kiu vojo muzika mi devos sekvi, kiun instruan manieron mi devos aliĝi (inter tiuj, kiujn mi ricevis), pri kiu kriterio mi devos uzi por pritaksi muzikon kaj muzikistojn, kiel studi, ludi, aŭ kiel plani mian karieron. Tiaj estis miaj malfermitaj demandoj atendante respondojn.

Ĉar mi ankoraŭ ne trovis metodojn kiu permesos min ekposedi tiun muzikan tradicion kiun mi renkontis, mi dubis inter instinkto kiu tiam jam komencis montri kordon, eksteran imitadon de tiu stilo de mia majstro, kaj soifa serĉo al kelkaj *modoj* (ekzemple, kiam mi elektas pecojn por formi koncertan repertuaron).

Konversaciante Oscar-n Ghiglian mi atingis esencan proponon por laboro: Ghiglia stimulis min ne provi eviti bezonon pri persona komparo je ĉiu peco mi ludis. Li asertis, ke stila imitado al alia muzikisto povis kuraĝigi, sed iam iĝis malproduktiva. Li daŭris dirante, ke se oni evitas riskon de persona rilato al tiu muziko, kiun oni ludas, oni povas nur kopii la *konkon* de alies interpretaĵo, kiu, tamen, restas malatingebla al sia profunda mistero.

Prenante tiun vojon serioze, mi decidis labori denove penante enmani tiun

muzikan ideon, kiun ĉiu peco, kiun mi ludis, donis al mi, kaj samtempe mi lasis ĉiun interpretativan decidon mian kreski el tio ĉi unue.

El tiu laboro mi *remalkovris* Segovian: aŭskultante liajn diskojn (kiujn mi jam konis delonge) mi eknotis, ke tiel ludi estis vere la eksplodo de persona kaj matura komparo kun muziko (poste mi eksciis, ke Segovia difinis interpreton kiel *eksplodo da libereco*). Tio donis al mi imagon de persono ege pli malproksime al mi, sed irante tiun saman vojon kien mi komencis tiam paŝeti.

Mi kredas, ke Segovia iĝis mia instruisto ekde tiu momento. Kompreneble mi esperis, ke mi iam havos ŝancon kompari mia laboron rekte kun li por havi ekzaktan juĝon pri mia klopodo.

Finfine tiu okazo venis dum Somero 1982, kiam Segovia instruis kurson ĉe la Konservatorio de Ĝenevo. Mi envisaĝis la kurson kun sinteno tre malsimila al tiuj de aliaj kursoj. Ne temis montri min aŭ trovi utilon al kurso, kio temis estis pli serioza, temis la momento de vero.

Mi tuj komprenis, ke Segovia montris grandan respekton por sonantan muzikon, respekton kiu tradukiĝis en atento skrupula al teksto muzika kaj -samtempe- provo identiĝi kun sia signifo (*interpreto*, li diris iam, *estas sintezo ĉiam pligrandiĝante*) por fari ludon *konvinkantan* aferon: fakte li atentigis al ni tiun kondiĉon kiu ebligis tion: ekzisto en ĉiu interpretisto de tiu *sakra fajro* kiu neniu instruisto povas anstataŭigi: *tiu amo, sen kiu* -li diris al

ni- interpretisto povas esti perfekta, sed nenio ajn pli...

Tiel, dum Segovia nepardone signalis siajn misrigardojn, siajn neraciajn interpretajn elektojn kaj serĉon de efektoj sencelaj, li egale pretis elporti

tion, kion li estis lerninta (*kion oni devas fari, kaj kion oni ne devas fari*, li kutimis diri). Tiel, li donis sekuran referan punkton (kio estis ekzakte kion mi longe serĉis!) sur kiun oni povas konstrui, liberaj por uzi pluajn kontribuojn de scio



Segovia instruas la verkinton, Piero Bonaguri.

trovaĵojn interpretajn el ni ĉiuj. Segovia, tiel brile persona en siaj interpretoj, ne provis konduki nin al imitado sia, sed li helpis nin ĉiun disvolvi nian propran muzikan personeco tute, metante ĉiun sian heredaĵon de eksperto, scio, gusto, je nia dispono. Li enkondukis nin tra viva kaj nuna ekzemplo de lia arta personeco (kun temperamento kaj preferoj) en humanan kaj artan lernon kiu supreniris ian specialan *version*. Tial, laborante pri ia sorto da repertuaro (trovinte difinita *poetiko*), kion oni donis al ni entenis stabilan kaj longdaŭran valoron kiu preterpasis ĉiun apartan aĝon aŭ pensmanieron. Segovia tradonis al ni

kaj metodaj ennovaĵoj (ekzemple, la analizan laboron, kiun Oscar Ghiglia estis disvolvinta aŭ tiun mirindan gitaran tradukon el Sudamerika mondo kiun Alirio Díaz estis inventinta).

Laŭ mia opinio, la metodo instrua de Segovia estis genia, ĉar ĝi basiĝis sur sugesto pri identigi, pri rilati kun kriteriaro pri lia humana kaj arta sinteno. Ĉio ĉi okazis pli tiele pro osmozo, kreita el vivi kun li, pli ol nura komunikado da teoriaj paroladoj. (Povus okazi, ke homoj alveninte al la kurso nur pro scivolo pri aŭskulti la paroladojn senluziĝis kaj reiris hejmen dirante, ke *Segovia ne instruas ion ajn*). Pro la supre dirite

kialo, la ekstera formo de lecionoj havis zorgita direkto kies detalaro funkciis kreante etoson taŭgan por ke la osmoza proceso aperis, por komenci el akurateco al ordo, al sida pozicio, al silento.

Segovia kutimis aŭskulti al ni tre zorge, kaj poste li rimarkis; li preferis (anstataŭ analizajn paroladojn) preni apartan punkton de la ludado li ĵus aŭdis (kelkfoje ion ŝajne sengravan); tiam li aldonis mallongajn, koncizajn kaj lumigajn rimarkojn. Ofte li ankaŭis aforismojn, anekdotojn, kaj aŭtobiografiajn ekzemplojn. Majstro Segovia, kiu ĝenerale estis bonhumora, furiozis (kaj li ankaŭ sciis kiel esti acida) kiam li konfrontis erarajn ideojn kiuj meritis pli seriozajn rimedojn korektigajn. Farante tion eble li riskis krei momentajn rankorojn (la lernanto decidu ĉu zorgi pli pri li mem ĉu pri io pli granda). Dum tiuj cirkonstancoj la ĉeestantaro vidis, ke tiun *sakran fajron*, pri kiu Segovia kutimis paroli, li mem portis, kaj tiu atesto ankaŭ instruis. Je la fino de la kurso li rehavis ĉion dirante ĝentile, ke *Mi notis, ke vi ne konvinkiĝis pri kelkaj aferoj kiujn mi diris al vi, sed ne maltrankviliĝu: kiam vi pliaĝiĝos, vi komprenos, ke mi pravis...*

La sistema peto, kiun de Segovia faris al ni por ludi pli malrapide, estis, ekzemple, pli efektiva ol tiom da vortoj (*Eĉ antaŭ ol vi komencos ludi, mi volas diri al vi: pli malrapide!*), kaj tiu helpis nin por ne perdi tiun kontrolon kiu faras ludon pli esprimi (*oni intervenendas la pecon sen halti ĝin*).

Mia rilato kun Segovia signifis por mi konfirmon malimplicitan kaj iel

definitivan pri kion mi jam estis koninta kaj vivinta (pli-malpli klare) ankaŭ tra miaj aliaj instruistoj: estas tradicio de arto, kulturo kaj civilizacio, kiu -kiel granda rivero- atingas nin el la pasinteco; estas gusto (mi volas diri, eblo preni humanan kaj artan valorojn) kiuj estas lernebla. Tute, tiu grandeco de Segovia vere konsistas el lia rekta kunigo kun okcidenta tradicio pri granda muziko, sen renonci li mem al marĝena rolo al kiu gitaro ŝajnis limiĝi, kaj, laŭ ĉiuj, neniu grava gitaristo sukcesis diskonigi (mi referas al **Miguel Llobet**, **Agustín Barrios** kaj **Francisco Tárrega**, kies tradicio eĉ Segovia diris, ke li sekvis). *Ni devas pensi pli pri muziko ol pri gitaro*, li kutimis diri, kaj vere tio ne estis ĵus diro.

En tiu granda tradicio mi rekonis saman evidento de lasta pozitivo kiun mi estis rigardinta kiam mi estis infano, kaj poste, bonfeliĉe trovis denove. Sen tiu lasta pozitivo, la sama kreiva agado pri skribi muzikon, kaj tiu defio pri ebleco komuniki (tiu muzika interpreto) perdis sian signifon, kaj, eventuale, neniam ekzistus.

Tiu respondeco kiun mi rekonas por daŭrigi mian laboron kiel ludisto konsistas el daŭre proponi tiuj ĉi tradicio, tiu ĉi fluo kiun eĉ nun enhavas novajn fruktojn (ekzemple ĉe tiom da komponistoj kun kiuj mi feliĉe kunlaboras por naskiĝo de nova muziko por gitaro).

Piero Bonaguri

(*El KOS* n-ro 134, novembro 1996, traduko kaj eldono permesita al *Kajeroj el la Sudo* ekskluzive).

Poeta angulo

Ho mamo de l' virinoj,
sorĉilo de la am',
el kies akraj finoj
fontas ĉia balzam'!

Fea duobla frukto
el paradiza park'!
Cimbaloj de volupto!
Pruo de Venusbark'!

Provokaj rondaj ŝildoj
por lukto de Amor'!
Altaraj sanktaj bildoj!
Ho rozoj el marmor'!

Dolĉa trezor' da karno,
al niaj manoj frata!
Je via pez' kaj varmo
ĉu eble iĝi sata?

Sunformaj, lumaj globoj,
al vi, jun-eliksir'!
sub la ŝvelantaj roboj
rampas nia dezir'.



Blindigas la okulojn
arka via lini',
kiam la ŝirmajn tulojn
rigard-esploras ni.

Kaj kiel la gimpintojn
defias neĝa Alp',
viajn elastajn pintojn
strebadas nia palp'.

Por vidi vin, ni sklavus,
por kisi vin, pefortus!
Vin polmi dion ravus,
vin suĉi, kaj ni mortus!

Georgo Prieterido Peneter

(El *Libro de Amo*, 1959.)

Aĉetebla ĉe nia libroservo

Literatura Premio Francisco Máñez

La Juĝantaro de la Literatura Premio *Francisco Máñez*, organizita de Ateneo *La Alianza* de Cheste, kune kun la lokaj esperantistoj decidis ne doni la premion al unusola verko, sed aljuĝi tri menciojn:

A. Verko de Antonio Marco Botella (Hispanio): *Kronikoj pri Cheste esperantista*, 100 000 pesetojn,

B. Verko de Kurisu Kej (Japanio): *Rakonto iom longa pri leteroj*, 75 000 pesetojn, kaj

C. Verko de Sabira Stalberg (Bulgario): *Konkoj en mia poŝo*, 75 000 pesetojn.

Manuel de Seabra

La 18-an de novembro je la 19:00 horo okazis ĉe la aktsalono de la kolegio de ĵurnalistoj de Katalunio diskutotablo pri la verkaro de Manuel Seabra. Partoprenis diversaj intelektuloj, kiuj ankaŭ verkis pri S-o Seabra: Herbert Mayer (direktoro de la Muzeo Internacia de Esperanto de la Biblioteko aŭstra) prelegis en Esperanto pri *La rolo de Esperanto en la verkaro de Manuel de Seabra*. Aliaj prelegantoj kaj prelegoj estis: Eduardo Mayone Dias (Universitato de Kalifornio, USONO), *La Cataluña de Manuel Seabra*, Basilio Losada: *Manuel Seabra como traductor*, Dimiter Ángulelov: *Portugal na obra de Seabra*, kaj August Bover: *Manuel de Seabra a la literatura catalana*.

Debatindaĵoj:**Kutime Faritaj
Demandoj:****20. Se ĉiuj malprobos
Esperanton..., ili devas pravi.**

Tio ne veras. Ne ĉiuj malprobos Esperanton, kaj multe malpli la ideon reprezentita de ĝi, tiu manko kiun ĝi klopodas rimedi. Sed mi parolos al vi pri tiu, kiu malprobis pleje tiun ideon kaj Esperanton mem: Adolfo Hitlero. Tiu ulo kaj siaj fisekvantoj engazigis milojn da esperantistoj ĉar li diris, ke ili estas komunistoj. Lia ruĝa samaganto, Jozefo Stalin, pafigis milojn da esperantistoj en Sovetunio ĉar li diris, ke ili estas burĝistoj kaj kontraŭrevoluciuloj. Ambaŭ murdegistoj estis ankaŭ grande azenoj, ĉar Esperanto ne estis, kaj neniam estos, aparta politika sinteno. Ĝi reprezentas unikan kulturon en la mondo, ĝi estas kritikisma sinteno pri realo, sed ĝi ne estas doktrino politika aŭ filozofia. En Hispanio kaj Portugalio Esperanto -dum diktaturoj de Franco kaj Salazar- estis persekutata vorte, sed ne age, tiel kiel ĉion, kio ne estis *inklina al la reĝimo*, sed ĝin oni toleris. Ĉe landoj demokratiismaj Esperanto ĉiam povis disvolvi senprobleme, kvankam ĝi estis ofte socie nekonvena. Tamen, en satelitaj landoj el Sovetunio Esperanto diskoniĝis multe pli, eble ĉar ili loĝaigis multe da malgrandajn lingvojn.

Kiam ideo estas bona por ĉiuj, ĝi malboniĝas por tiu malplimulto kiu havas povon. Kaj tiu malplimulto kutime regas komunikilojn. Kaj tiuj kreas

opinion. Tial tiom da homoj kondamnas Esperanton sen scii tion, kio ĝi estas, nek pri tio, kion ili parolas.

**21. Kial la plej parto de
geesperantistoj estas maljunaj?**

Tio ne estas tiel, kvankam eĉ tion oni klarigas. Unue, ekzistas multe da junuloj kiuj lernis Esperanton. Fakte, ĉiuj homoj al kiuj mi iam instruis Esperanton estis pli junaj ol dudekjaraĝo. Ekzistas multaj asocioj de junaj esperantistoj, kiel *Juna Amiko* aŭ la *Rosetta Ŝtono*, kiun oni kreis ĉe la Mursja Universitato. Tamen, veras ke se oni vizitas kelkajn kongresojn de Esperanto kiuj ekzistas ĉiujare en la tuta mondo, oni vidos, ke la kongresanoj averaĝas maljuna aĝon. Tio estas tiel ĉar homoj pli aĝaj ol 30 jaroj havas pli bonan ekonomion, kaj emerituloj disponas, krome, pli multe da tempo. Sed ankaŭ veras, ke multaj homoj kiuj kiam ili estis junaj batalis kontraŭ Esperanto -aŭ simple ignoris ĝin- bezonis tutan sian vivon por maturiĝi kaj kompreni la esencon kaj naturon de Esperanto, venkante antaŭjuĝojn -kutime alies- kiuj malebligis ilin vidi klare. Tiuj homoj alvenas malfrue al Esperanto por helpi krei kaj solidigi la **Kulturon de la Tuta Homaro**, sed almenaŭ ili jam povas profiti ĝin je sia nuna stato.

**22. Kiom da personoj parolas
Esperanton tra la tuta mondo?**

Tiu demando estas malsimple respondebla. Ni scias, ekzemple, ke 300 miljonoj da homoj parolas la hispanan en la mondon ĉar oni scias kiom da homoj loĝas en ĉiu lando hispane parolanta. Ni aldonas la ciferojn, kaj

ankaŭ kalkulon de kiom da personoj vivas eksterlande (kiuj ankaŭ estas censitaj) kaj oni povas trovi informon tre akuratan pri kiom da personoj aliĝis hispanan kurson ĉe oficialaj kurscentroj pri eksterlandaj lingvoj. Sed por atingi tiun totalan nombron ni uzis servojn de statistikaj oficejoj de kelkaj landoj, kaj ankaŭ ni uzis aliajn instituciojn. Esperanton oni ne studas oficiale krom en kelkaj izolitaj landoj, kiel Ĥinio, Pollando aŭ Hungario. En la resto de la mondo oni povas nur fari estimon laŭ la nombro da esperantaj asocioj. Tamen, ekzistas multe da esperantistoj kiuj ne apartenas al iu ajn asocio. Tial oni ne povas esti mi ekzakte, ankaŭ ne alproksimiĝante. Plej realisme estus diri, ke malpli ol ni dezirus, sed multe pli ol niaj kontraŭuloj volus. Sed tio estas tre dubesenca, kaj por ke oni ne diras, ke ni evitas respondon, ni diras, ke la plej pesimisma estimo taksas la nombron ĉirkaŭ 20.000, dum la plej optimisma diras, ke ekzistas 30 miljonoj da geesperantistoj en la mondo! Sed plej gravo pri tiu temo estas, ke tute ne gravas por ni esperantistoj, kiom da homoj parolas Esperanton. Preferinde estas, ke estas malmultaj bonaj ol multaj malbonaj uzantoj de Esperanto. :-) Vidende, nia nombro kreskos kaj kreskos kun la tempo, sed ĉiun tagon tiuj homoj kiuj jam esperantistiĝis iomete plibonigas kaj pligrandigas la kulturalan riĉaĵon de Homaro. Ni konsideras homon pli kiel tuto ol kiel nacia aparteco. Tiuj, kiuj venos post ni, trovos multe da vojon glatigitan. Sed tiu vojo iros tien, kie ni malfermis ĝin...

23. La angla estas la latina de la jarcento XX-a. Oni NE bezonas Esperanton.

Tio estas vera. Kiam vi diras *latina*, mi supozas, ke vi volas diri la rolon de pontolingvo kiun la latina ĝuis dum la Mezepoko: oni parolis ĝin en ĉiuj landoj en Eŭropo, sed ĝi tiam estis la lingvo de neniu ajn el ili, ĉar la Romia Imperio falis jam kelkajn jarcentojn antaŭe. Sed, kiu parolis la latinan dum la Mezepoko? Evidente, ne la komunpopolaj homoj: ĝin parolis preĝistoj (multaj el ili tre malbone, kiel oni povas pruvi konsultante plendojn rilate al tio fare de episkopoj en siaj kunvenoj, kies aktoj alvenis al ni) kaj erudiciuloj, tio estas: humanistoj kaj scienculoj. Alkŭino el Jorko -ekzemple-, estante anglo, povis instrui en La Sorbono —la fama pariza universitato—, kaj en iu ajn alia eŭropa universitato, kaj liaj lernantoj tute komprenis lin, ĉar *ili sciis la latinan*. Sed ni ne forgesu, ke erudiciuloj estis malmulte da homoj, kaj universitataj studentoj estis malmultaj pli. Preĝistoj studis dum pli ol dekdu jaroj (en kelkaj landoj ankoraŭ ili studas tiel longe) por iĝi preĝistoj, en seminario. Sufiĉe da tempo por regi malfacilan lingvon. Tamen, se oni parolas al iu erudiciulo nuna pri klasikaj lingvoj, li diras, ke NENIU PAROLAS la latinan aŭ la grekan nun, kaj tiu latina parolata de nunaj preĝistoj estas *vulgara*, ne *klasika* latina.

Sed KIAL ONI FORLISIS LA LATINAN? Kiam Gutenberg elpensis printilon, kulturo demokratiĝis, tio estas, atingebliĝis al ĉiuj, ĉar libroj

malmultekostiĝis ege, kio estis en si mem kultura revolucio. Popolaj homoj lernis legi kaj skribi, malkreskante multe analfabetismon ĝistiam ĝeneralan. Sed libroj, sed vendendaj, ne povis esti en la latina, lingvo kiun popolo ne regis. Tial graviĝis la tiel nomitaj *vernakularaj lingvoj* (tio estas, lokaj lingvoj kiel la franca, hispana, angla...), kiuj forpuŝis la latinan malrapide, sed efektive, ĝis la hodiaŭa klerula situacio.

Per tiu longa enkonduko mi volas diri, ke jes, ke la erudiciuloj de la XX-a jarcento uzas la anglan por siaj komunikoj kaj eldonoj. Ĉiu el ili preferus uzi sian lingvon, sed ili scias, ke tio estas neebla, kaj ili konsentas uzi ian anglan detranĉitan kaj senspritan, al kiu mankas stilo kaj riĉeco leksikologia kaj sintaksa, kiun iuj nomas *internacian anglan*, volante per ĝi eble legiĝi siajn egajn malakurataĵojn lingvajn kaj -ĉefefonetikajn. Estu, kleruloj uzu la anglan se tiom forte ili deziras tion. Sed popola gento, ni kiuj estas nek Erasmo de Rotterdam, nek Isaak Neŭtono, nek Hipatia de Aleksandria, nek Emily Brönte, ni, malklera nura civitanaro de la mondo tuta, bezonas facilan lingvon, kiu post dusemajna studado permesas al ni kontroli tiujn bazajn situaciojn de ordinara vivo. Veras, ke la angla estas iel simpla lingvo, relative pli facila ol aliaj eŭropaj lingvoj. Veras ankaŭ, ke ĝi ne estas sufiĉe facila por niaj bezonoj. Ununura alternativo estas Esperanto. Esperanto posedas gramatikon facilan kiu



Imperie
kronaj kapoj
ne komprenas
bezonojn de
Esperanto.

Brita Reĝino Viktoria

konsistas el 16 regulojn SEN IU AJN ESCEPTO, kiujn oni povas lerni dum unu vespero. Ĝi havas vortaron bazan havante ĉirkaŭ mil vortoj, kiujn oni povas multoblige 200foje danke al sia sistemo afiksa, kiujn oni povas siavice kombini libere unu la alian por esprimi novajn konceptojn. Sed NENIU UZAS 200 000 VORTOJN en iu ajn lingvo. En la hispana kleruloj diras, ke oni bezonas 7 000 vortojn por paroli pri iu ajn temo, kvankam en la angla oni bezonas nur 3 000. Sed en Esperanto sufiĉas trifoje malplie, sed se bezonate, oni povas multoblige ducentfoje sen bezoni konsulti vortaron. Alia avantaĝo de Esperanto estas, ke preskaŭ ĉiu baza vorto jam *sonas al ni*, kiel **baza, homo, skribi, inteligenta, porko, blanka, rapide**, ktp.

Tial ni povas konsenti, ke vere LA ANGLA ESTAS LA LATINA DE LA XX-a JARCENTO. Esperanto estas **vernakularo tutmonda**, la lingvo por ke ni ĉiuj, -ne plu nur la klera elito- komprenas unu la alian, sen bezoni esti Erasmo aŭ Hipatia; kaj ankaŭ ĝi servas por ke -tiuj kiuj volas- ni povas kunfratiĝi en tuta libereco kaj egaleco, atingante finfine tion, kion popolo petis kaj petas ekde la Franca Revolucio, antaŭ du jarcentoj, kaj ke ankoraŭ restas plenumota demando por homaro.

Daŭrigota de

Olga López.

Propra deklaro: Kialoj de mia agnosko de malsumetiĝo.

De antaŭ tie longe mi klare konsciis ke mi rezignos uzi la armilojn. Ĉar mi estas pastro, mi pensas ke dum mia armeoservo mi povos ankaŭ akompani kaj fari fratecan servon al tiuj junuloj armeokamaradoj miaj (ankoraŭ mi respektas tian ĉi sintenon). Poste mi decidis konsciencie objeti, certe ĉar mi estas kontraŭa al la uzo de armiloj, sed ankaŭ mi agnoskas ke pro mia komforto ne esti devigata forlasi la parohejon kie mi laboris. Pro diversaj cirkonstancoj mi iom post iom konsciiĝis pri la fakto, ke tiu ĉi temo

donas min la ŝancon serioze konsideri ian kompromiton labori favore al la paco. Kiel persono kaj kiel kristano, esplorinte kaj pripensinte la temon, kaj pro civitaj, evangeliaj kaj etikaj kialoj (por mi nedisiĝeblaj unu de la aliaj) mi estas decidinta esprimi mian kompromiton pacokonstruan, laŭ diversaj manieroj, inter ili per miaj malsubmetiĝo kaj aniĝo al MOC (hispana mallongigo de *Movado de Konsciencaj Objektaj*), kaj doni al mia sinteno signifon preter miaj personaj interesoj. Mi deklaras mian malsubmetiĝon ĉar mi kredas je la PACO, je la paco ampleksasignife, je la efika frateco inter ĉiuj homoj (el mia fido mi konsideras ĝin kiel donacon de Dio Patro kiu atingas nin per la Spirito de Jesuo) kaj kiu nur povas havi kiel fundamenton la veran justecon je ĉiuj

tavoloj socia. Kvankam mi scias ke tia ĉi paco ne povos plene realiĝi definitive en tiu ĉi mondo, mi kredas je ĝi ĉar mi konvinkiĝis pri la bezono de ni ĉiuj homoj pri utopiaj revoj, kiaj tiuj ĉi, por ne pasive rezignacii antaŭ la fataleco de la kutimaj situacioj, aŭ de la *ordoj* (eble *senordoj*) establitaĵ.



Mi esprimas mian malsubmetiĝon ĉar la tiel nomita *Nova Ordo Internacia*, en kiu ni disvolviĝas, kaj kun kiu ni ĉiuj kunlaboras, ŝajnas al mi sistemo socie, ekonomie kaj politike malbonega, aŭ difinate

ekde la fido, ĝi konsistas el *strukturoj peko-strebaj*. Mio pritaksas la malsubmetiĝon (aŭ civilan malobeon) kiel ilon por *malsolidariĝoj konkretaj* kiu pridubigas tiun ĉi sistemon tutmondan. Mi estas malsubmetiĝonta ĉar, antaŭ historia momento, kiam estas en krizo la partopreno de la socio en la politika vivo (kiu jam preskaŭ konsistas nur el enmeto de paperajo en skatolon, ĉiun jarkvaropon, por elekti novajn homojn farontajn la saman politikon) delegante, kiam ne rezignante, la proprajn respondecojn pri la konstruado de la komuna bonstato (jen krizo de la vera sinteno demokratia), mi volas ke tiu ĉi estu unu el miaj kontribuoj por krei konsciencan kaj trovi manierojn kunhavi la partoprenon kaj respondecon rilate la demarŝojn de mia kunezistado.

Mi malsubmetiĝas por kunlabori pri la pripensigo de la defenda afero, kaj de la laternativoj neperfortaj por la solvo de la konfliktoj kaj atingo de la paco; resume, por kunlabori je la aperigo de etika, porpaca kulturo.

Mi malsumetiĝas kontraŭ la Deviga Armeservo, rezigninte pri mia stato de konsciencia objekto, kaj sekve, daŭrigi la Alternativan Civilan Servon, ĉar ĝi estas diskriminacia; ĉar oni estas utiligante ĝin kiel ilon por enpartigi la fenomenon de la objekto en la armean strategion, tiel ke ĝi ne enriskigu ilin, ĉar ĝi estas misorganizita kaj ne utilas, plejofte, por atingi la sociajn kaj solidarajn celojn atribuitajn al ĝi; ĉar ĝi forigas anstataŭas aŭ malhelpas la kreon de novaj laborpostenoj, kaj, samtempe, la investojn buĝetajn kaj profesiajn penojn kiujn ja postulas la nuntempa socia problemaro.

Nature, oni povas dedukti ke la celo de mia decido NE SOLE ESTAS depostuli la abolicion de la Deviga Armeservo, kiu jam estas anoncita. Tial mi kredas ke mia decido plu havas sencon; aparte esti pro persona kohereco.

Mi alprenos la punojn kiujn oni trudos al mi, kiel esprimon de la aŭtenteco de mia decido (kiu ne serĉas personajn interesojn, sed havas komunuman intencon) kaj de la solidareco kun tiuj kiuj, antaŭ ol mi, estas punsufertantaj pro la sama kialo.

Finfine, ne gravas al mi ĉu mia ago estos senefika (almenaŭ ŝajne), ĉar kiel diris Mournier (prononcu *murnje'*), *mi ne pensu pri la sukceso, sed pri la atesto*, krome, kiel kristano mi firme kredas

ke la Regno de Dio estas kreskante malrapide, sed reale.

Mi kredas je la povo de la Dia Spirito.

Plácido, el Elche.

Noto: la verkinto suferas sian punon ĉe la prizono de Alcalá-Meco (alkala' meko).



Venas el paĝo 11-a

antaŭvidi la plej adekvatan vojojn por faciligi la progerson kaj ne erari en la direkto. La homo kaj la socio ĉiam esos perfektigeblaj. Tamen, fiziologie ni nur estas herede perfektigeblaj laŭ geologiaj epokoj, sed la kultura perfektigo povas esti rapida, tamen nefiksita, malekvilibra kaj ofte efemera. La disvolvigo de la kulturo bezonas senhaltan penadon. Tiu penado fariĝas devo de ĉiu homo, kaj povas aŭ devas komenci por la perfektigado de ni mem. Pro tiu penado ni fariĝas indaj por vivi des pli bonan socion.

La esperantismo apartenas al tiu penado. Unu kultura lingvo, Esperanto, por ebligi la interkompreniĝon planed-skale. Interna ideo por tiel same ebligi la planedan kunvivadon kaj fine eĉ la zamenhofa homaranismo por fari, ke tiu kunvivado ne estu trudata uniformeco, sed volonta unueco akorda kun la pluraleco. Pluraleco de ĉiu individua vivado kunligita al la kolektiva vivado de ĉiuj.

Giordano Moya.

KIO ESTAS PROGRESO?

Esperanto viglas

Foiro de libroj.

Tiun ĉi aŭtunon, ekde la 7-a de novembro ĝis la sekvonta 16-a, okazis en Murcio la foio de libroj. La foiro de



Dum la foiro, veteranaj esperantistoj subtenis nin per sia ĉeesto.

Prezidanto Bustín.

Kasisto Bernabéu

la jaro 1997 ne estas same kiel alia foiro de pasintaj jaroj. Kial?

La respondo estas tre facila: Esperanto.

Okazis, ke ĉijare la esperantistoj el Murcio havis du kvadratajn metrojn en la informejo de la foiro. La prezidanto de la ĉi jara foiro, Sr-o **Manuel García Elbal**, Prezidanto de la *Asociación Gremial de Libreros de Murcia* (gilda asocio de libristoj de Murcia) kaj posedanto de la librovendejo kie kelkfoje ni multobligis niajn eldonaĵojn, memoris pri ni, kaj li propravole petis, ke ni prelegu pri Esperanto kadre de la kultura flanko de la foiro, kaj ankaŭ aranĝu ekspozicion de libroj en Esperanto, se ni havas. Ni volonte profitis la okazon, kaj krom la prelego,

dirita de Jesuo de las Heras sub la titolo *El síndrome de Babel* (t.e.: la simp-tomaro de Babelo), ni rapide petis el niaj libroservoj (tiu de HEF kaj de HALE) sufiĉe da librojn por montri al la publiko, ke Esperanto ankoraŭ vivas. Pro tio ni ege dankas al **Manolo García Elbal** kaj al la **Gilda Asocio de Libristo de Murcia**, de nun konektita al la historio de Esperanto en Murcia.

La unuan tagon, la apudaj librovendistoj ne multe ŝatis nian ĉeeston, la duan oni toleris ĝin, la trian oni amike parolis al ni, kaj la lastan tagon, ni donacis al ili du ĉemizojn kun vorto *Esperanto* en ili, por ke ili propagandu nian lingvon!

Ĉu bonis, ke ni estis tie tiam? Ni responde diras, *jes*. Kelkaj faktoroj sinrespondas:

~ *Unue*: ni vendis librojn el la stoko de ambaŭ niaj libroservoj.

~ *Due*: multaj malnovaj studentoj de Esperanto retrafis ĝin. Denove la verda viruso trairis siajn vejnojn!



K-do Bernabéu parolas al librovendisto

Dum la prelego pri *La simptomaro de Babelo*



~*Trie*: homoj ne sciinte pri la vorto kaj pri la signifo de Esperanto, lernis ion novan pri ĝi. Dum du semajnfinoj kaj la intermeza labortagoj *Miguel Gutiérrez Adúriz* kaj *Fernando de Diego* estis konataj nomoj en Murcio, per siaj gramatikoj.

~ *Kvare*: personoj, kiuj studas modernajn lingvojn kiel anglusonan aŭ italan aĉetis gramatikon de Esperanto, kaj poste ili revenis por aĉeti ion en *facila Esperanto* (ĉu ekzistas *malfacila Esperanto*?)

~ *Kvine*: kelkaj aĉetuloj de esperantaj libroj nek scias Esperanto, nek ili scios ĝin. Al unu el ili ni demandis, sekve, *kial vi aĉetas Don Kihoton, se vi ne volas lerni Esperanton?* Li diris per komprenebla maniero, ke *mi aĉetas ĉiun publikaĵon de don Miguel de Cervantes, ka pro tio mi aĉetas el Quijote en Esperanto.*

~ *Sese*: homo diris al ni: *mi havas du filinojn, dekdujaraĝa kaj dekjaraĝa, kaj mi volas, ke ili ambaŭ lernu Esperanton. Kie estas via klubejo?*

~ *Sepe*: ankaŭ nin vizitis homoj kiuj diris: *Esperanton, ne dankon!*

~ *Oke*: persono aŭdis nin parolante Esperanton, kaj li diris: *ni pensis, ke Esperanto jam mortis! Mi lernis Esperanton antaŭ 20 jaroj. Finfine mi aŭdas ĝin!* Finfine tiu homo volas lerni denove Esperanto kaj vojaĝi al Kongreso de SAT en Ukrainio.

~ *Naŭe*: ne mankis personoj kiuj aĉetis librojn de Esperanto ĉar ili diras, ke Esperanto estas donaco de amo.

~ *Deke*: estis persono kiuj ŝatintus kunigi nin dum la foiro, sed li subite lasis nin. Laŭ mia kredo, **amiko Linares** jam parolas Esperanton kun Dio, en la alia vivo. Estu nia esperanta foiro omaĝo al lia esperanta zorgo dumviva.



Johano Antonio Cabezas



Centjariĝo de Guillermo Rovirosa

Ĉijare (1997) oni celebris la unuan jarcenton de la naskiĝo de Guillermo Rovirosa (prononcu ĝijermo rovirosa), ŝlosila viro por la gradaltigo de laboristaj aktivuloj dum la frankismo; jen scienca esploristo kiu kaptis la atenton de Albert Einstein (pr. albert ajnŝtajn), kiu diris pri li, ke li estas la plej bono kiun li estis vidinta en Hispanio, krom kristana superelstara aktivulo. Li dediĉis sian vivon, post sia *duafoja 1-a komunio* al la promocio de aktivontaj laboristaj kristanoj, transformante sian vivon en konstantan kreskadon malsupren, ĝis sia morto en malriĉeco.

Ni volas dediĉi tiujn ĉi liniojn je lia faĉo de gradaltiginto de aktivuloj. Fininte la Civila Milito, li estis enprizonigata pro la posteno kiun li disvolvis kiel prezidanto de la entreprena laborista komitato en Madrido; por tiu ĉi posteno li estis elektita unuanime, malgraŭ sia neaparteno al iu ajn el la sindikatoj kaj partioj tiamaj. Tiun ĉi konfidon flanke de siaj kunuloj, Franko punsuferigis lin per enprizonigo. Poste, la punon oni komencis mildigi al li kiam lin oni portis partopreni je la instalado

de Instituto *Torres Quevedo* (pr. tores kevedo) de la Supera Konsilantaro Sciencaj Esploroj. Jam libera, en 1946-a, li estis tiu, kiu lanĉis la H.O.A.C. (hispana mallongigo de *Katolika Kunfrataro por Laborista Agado*) kies agado, laŭ aserto de Antonio Gutiérrez (pr. antonjo gutjeres'), Sekretario Ĝenerala de la sindikato CCOO (mallongigo hispana de



Laboristaj Komisionoj), ebligis la ekziston de tiu ĉi sindikato. En la tiam Hispanio de la 2-a duono de la kvardekaj karoj, en ambaŭ oficialaj maldekstrularoj; tiu interna, kaj tiu alia en la ekzilejoj, tre viglis la ideo, ke la frankisma reĝimo estas pereonta post la milita malvenko de Hitlero, kio estigos,

siavice, ke la venkintaj burĝaj demokratioj anstataŭos la frankisman reĝimon per alia simila al tiuj de la venkintaj potencoj. Sed ne tiel okazis kaj, post la traktatoj kun Usono, Franko atingis internacian apogon daŭrontan ĝis la fino de siaj tagoj. La oficialaj maldekstrularoj eraris bruege je siaj analizoj, kaj Hispanio suferis 30 jarojn pliajn da frankismo.

Rovirosa ne kredis je la fino de la frankismo en 1945-a, kaj ekigis la porlaboristan apostoladon, kiu, dum li

vivis, estis kvazaŭ matrico de gradaltigoj de aktivemaj kristanaj laboristoj, kiuj ebligis dum la 15 unuaj jaroj de sia ekzisto la jenon:

- ~ Semi esperon en la hispana laborista klaso; la sola venkito de la Civila Milito; se la novaj grupoj de aktivuloj; la plejmulto el ili konvertitoj el anarĥisindikatismaj, komunismaj, kaj socialismaj organizaĵoj; realpreni sian perditan esperon post la milita malvenko.
- ~ Oni ekfunkciigis laŭlarĝe de nia teritorio multon da kulturaj grupoj de kristanaj aktivuloj, krom la ĉiusemajnan ĵurnalon *Tú* (ci en la hispana), organo de HOAC, kiu, danke al la aktivula penado de stratvendoj, estiĝis la dua, pro sia graveco, en Hispanio ĝis sia prohibicio flanke de la frankisma estraro.
- ~ La influo de la HOAC reflektiĝis en CCOO kaj USO (mallongigo hispana de *Unio Sindikata Laborista*). En la politiko, Julio Cerón (pr. ĥuljo seron'), fondinto de la Popola Liberiga Fronto, petis kelkajn aktivulojn de la HOAC fariĝi ties estrarmembroj. Multajn kooperativojn ekfunkciigis tiuj kristanaj aktivuloj.
- ~ La persekutoj kontraŭ la aktivuloj de la HOAC komencis en la kvardekaj jaroj.
- ~ Religie, Roviroso estis la figuro kiu ebligis en Hispanio la dialogon inter la Katolika Eklezio kaj la laborista klaso, kio kontribuis al la

senmalamigo inter la intermilitintaj Hispanioj.

Kiam en 1996 celebris HOAC siajn kvindek jarojn da ekzisto, politikistoj, politikemuiloj kaj sindikatanoj klopodis esti fotataj je la unuaj planoj (kaj sukcesis pri ĝi). La laboristaj historiaj organizaĵoj tie ĉeestantaj, estis la samaj kiuj en 1946 ne opiniis fundamenta la kreon de kultura fronto por la restarigo de la laborista movado.

Guillermo Roviroso, al kiu iam oni juste pritaksos en Hispanio, venkis al ili pri la batalo al la planado kaj restariĝo de la laborista movado. Nune, kiam la transiro al la postindustria socio estas malaperiginta la aktivulajn laboristajn organizaĵojn, Roviroso, en sia centjarĝo, eble dirus al ni ke la estonteco de la gradaltigo de la subpremitoj devos fundamentiĝi sur la fronto religiakultura. Politiko, sindikatismo, korporaciismo, ktp, estus eroj por tiu gradaltigo se estus aktivuloj kiuj enkarnigas la liberigan idealon. Sen ĉi tio la burokratiismoj, la malsolidareco, la interklasaj akordoj, ktp, plu svarmos.

En cia centjariĝo, Guillermo Roviroso, la religia konvertiĝo kaj la solidara kulturo povas gradaltigi aktivulojn kaj, per tio, ŝanĝi la socion. En via centjariĝo vi plu estas la estonteco.

Membroj de HOAC



Vi ekkonos Al-Andalus

Vi ekkonos Al-Andalus iam inter azaharoj kun l' allogo de legendo pro la bellirik' kaj amo, respektama kun la kredoj kaj honesta pri l' Korano.

Vi ekkonos Al-Andalus rigardante ĝiajn palmojn, admirante la moskeojn kie lernis la araboj, la hispanoj kaj hebreoj kla sciencojn kaj la artojn.

Vi ekkonos Al-Andalus kie flugis versosagoj, poetinojn vi tuj trovos regantaj poem-verkadon kaj kun ili sciencistojn rfamaj pro la sci' kaj saĝo.

Vi ekkonos Al-Andalus ebrui de sun' kaj ĉarmo, kie sur rev-valoj verdaj galopadas la ĉevaloj kiel glavoj tranĉas venton kaj la steloj la kosm-spacon.

Vi ekkonos Al-Andalus perlo de Lirik' kaj amo!

*Verkita en la hispana de Peter Browne, honore al kamarado Antonio Marco Botella okaze de la publikigo de lia verko **Lirikaj perloj de Al-Andalus**, versoj trad. al Esperanto en aprilo de 1997 de A. M. B.*

NOTO.- Jen la nova retadreso de HALE: **hale@distrito.com**. Per ĝi viaj artikoloj atingos nin pli rapide!

Venas el paĝo 27

Murcio dediĉis multajn horojn al la studado de la Logiko kaj verkis ampleksan kaj verŝajne tre interesan traktaton pri filozofio, neciitan de liaj biografoj, sed hodiaŭ ne disponebla.

El la tuta verkaro de Ibn Sida nur du manuskriptoj aperis: la indikita **Kitab al-munhkam**, valora amplekas vortaro, kaj **Kitab al mujassas**. Sub vidpunkto filologia estis speciale interesaj liaj komentoj pri la poezia antologio **al-Hamasah**, pri la granda orienta poeto al-Mutanabbi, kaj pri la poemoj de la plej granda gramatikisto de tiu jarcento al-Zayyayi, aŭtoro de la verko **Kitab al Yumal** (libro de la frazoj).

Ibn Sida, la blindulo de Murcia, forpasis en Denio (1066a j.)

Grava murcia antologo estis Abu Yafar ahmad al-Dabbi, naskiĝinta en urbeto proksima al Lorko, kvankam kutime li loĝis en Murcia, aŭtoro de grava vortaro **Bugyat al-multamis fi tarif richal al-Andalus** (pli-malpli: Deziro de tiu, kiu esploras la historion de gentoj de Al-Andalus), enhavanta lkabiografiojn de plej elstaraj poetoj, juristoj kaj aliaj eminentuloj de Al-Andalus ĝis la jaro 1195. Ĝi estas kvazaŭ daŭrigo de alia antaŭa samtema libro verkita de Ibn Humaydi.

Ibn Dabbi forpasis en la jaro 1202.

Ĝino de La tajfo de Murcia

LA TAJFOREGNO DE MURCIA,

El Lirikaĵ perloj de Al-Andalus,

de Antonio Marco Botella



*Talamanki sen rivalo;
ja Ubaydi la leksikojn
plene mastras kiel mago..., ktp.*

La poemo estas pli longa, sed la ekscesa mencio de nomoj (tiuj de liaj profesoroj), interesa sub vidpunkto historia, sed tute ne favora por la ritmo de la versoj, decidigis min ne traduki la poemon komplete.

Reveninte Ibn Sida al Murcio, baldaŭ li fariĝis la plej kompetenta fakulo de Al-Andalus pri leksikografio. Tiu alta prestiĝo altiris la atenton de la reĝo de la tajfo de Denio, kiu invitis lin rezidi ĉe sia palaco sub sia mecenato. La reĝo de Denio, al-Muwaffaq (Abu Yayŝ Muyaĥiob b. Abd Allah ibn Yusuf al-Amiri) ankaŭ nomata de la kristanoj *Reĝo Lupo*, konkeranto de Balearoj, Sardujo kaj aliaj regionoj, estis homo kun grandaj scioj kaj inklinoj al la scienco kaj regionoj, estis homo kun grandaj scioj kaj inklinoj al la scienco kaj beletro, tial li faris ĉion eblan por atingi sub sia protekto elstarajn intelektulojn, m kiuj donis brilon al sia kortego.

Ibn Sida komencis la gigantan taskon verki plej kompletan preskaŭ dudek voluman leksikonon, kiun li aperigis sub la titolo *Kitab almunhkam fi-l-Luga*, strukturita alfabeto konforme al fonetikaj reguloj. Ĝi estis ordigita laŭ temoj, kio ebligis al poetoj, oratoroj kaj fakaj profesoroj uzi ĝin facile. Cetere,

la verko estis dividita en fakojn, ĉiu pritraktanta specifan temon. Li donis abundajn eksplikojn pri ĉiu termino, ekzemple, pri "la ĉevalo", "la kamelo", "la vestoj", "la birdoj", "la manĝoj", k.a. Li eksplikas en la *Antaŭparolo*, ke li pensis tiun novan specialan sistemon, ĉar ka antaŭaj verkitaj leksikonoj estis nekompletaj kaj nekontentige esprimis la riĉecon de la lingvo araba.

Aldone al siaj scioj pri lingvo kaj literaturo Ibn Sida ankaŭ interesiĝis pri filozofio, ne sen atenti la religiajn skrupulojn, jam tradiciajn en la araba mondo. Jen poemeto esprimanta lian vidpunkton:

*Ne tro zorgu pri scienco
de plej lertaj filozofoj,
certe ili ne atingas
pri la vero traf-respondojn.
Tamen, se per stud' kaj peno
vi persistas sur la vojo,
studu nur la medicinon,
la logikon kaj la kontojn,
ĉar restantaj stud-sciencoj
kun obskuraj konkludsolvoj
estas ja malpermesataj
de l' islamaj leĝ' kaj normoj...
Fine, studis mi logikon,
kun reguloj kaj metodoj,
ĉar serĉanto de la vero
rajtas scii ĉiajn konojn.*

Malgraŭ tiuj zorgoj kontraŭ la spekulativaj sciencoj, la blindulo de

Daŭrigas en paĝo 26

Kajeroj _____



_____ **el la Sudo**


BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

**REDAKCIO: Poŝtkesto 4461,
E30080 MURCIA,
HISPANIO**

**Retskribu al
hale@distrito.com**

<http://www.distrito.com/esperanto/kajeroj.htm>

<http://www.dragonfire.net/~Esperanto/kajeroj.htm>



Depósito legal: Z-2398-88

Presejo: Alegría.